




# monda solidareco

N-ro 117 - Junio - Julio 2016 - kvaronjara - 1.25 €



Jordanio rifuĝejo Za'atri por siriaj rifuĝintoj (2013)

UNo (**Unuiĝinta Naciaro**) kunvokis pintkonferencon por « **Pridiskuti amasajn irojn de rifuĝintoj kaj migrantoj** ». Ĝi okazos la 16-an de septembro 2016 en la sidejo de UNo en Novjorko. Raporto de la ĝenerala sekretario estos eldonita en majo por strukturi la diskutojn, kaj por faciligi la serĉon kaj kolektadon de datumoj, vere ĝisdatigitaj je nacia kaj regiona niveloj. La delegitoj de la registaroj kaj de la neregistaraj organizaĵoj (NRO) konsentas por diri ke estas tempo adopti metodon, kiu multe pli konsideras la diversajn dimensiojn de la migrado kaj la temojn ligitajn al la rifuĝintoj, kiuj efikas kaj al la devenlandoj kaj al la cellandoj kaj paslandoj. Necesas plibonigi nian komprenon de la kaŭzoj de tiuj internaciaj homfluoj, kaj de la kompleksaj rilatoj, kiuj ligas tiun temon al evoluigo, al armita konflikto kaj al mediaj ŝanĝiĝoj.

S-ino Karen Abu Zayd (Usono) estis nomumita speciala konsilantino por la pintkonferenco, kaj fakte, estos ties organizantino. De 2005 ĝis 2010, ŝi estis ĝenerala komisarino de la Organizaĵo pri helpo kaj laboroj de UNo por la palestinaj rifuĝintoj (UNRWA). Antaŭe, ŝi okupis altresponsajn postenojn en la altkomisaro de UNo por la rifuĝintoj. Ŝi estas universitatnivela fakulino pri Mezoriento.

## Enhavo

Rifuĝintoj kaj migrantoj .....	p. 1
Maroko : Agrikulturo en malekvilibro .....	p. 3
Ĝenerala asembleo en Sokodeo (Togolando) .....	p. 5
TGUMAINI Support Group .....	p. 6
Vojoj de la Solidareco .....	p. 7
El la F.A.Konsilantaro ; kolofono .....	p. 8

Freŝdate, la Servo pri ekonomiaj kaj socialaj aferoj de UNo eldonis raporton pri internacia migrado, kiu indikas ke ekzistas en la mondo 244 milionoj da migrantoj, el kiuj 76 milionoj vivas en Eŭropo, 75 milionoj en Azio, 54 milionoj en Norda Ameriko, aliaj ankaŭ en Mezoriento, en latina Ameriko kaj en Pacifiko, aparte en Aŭstralio kaj en Novzelandoj.

*La specifeco de MSM estas meti la problemon de la individua rajto sin nutri je la nivelo de monda juro kaj celi respondi al ĝi pere de transnacia organizado de la solidareco sub la juĝorajto de la Kongreso de la Popoloj.*

Al tiuj nombroj aldoniĝas proksimume 20 milionoj da rifuĝintoj, homoj, kiuj trairis landlimojn por fuĝi ekster armita konflikto kaj subpremon, al kiuj aldoniĝas proksimume 40 milionoj da enlandaj delokitoj.



La ekstrema malriĉeco, la kresko de la loĝantaro, la altaj niveloj de senlaboreco kaj la armitaj konfliktoj estas kialoj por foriri, kiam la komunikiloj kaj la transportiloj, pli facilaj ol neniam antaŭe, liveras la rimedojn por foriri.

La fluo de rifuĝintoj kaj migrantoj al Eŭropo de 2015 kondukis la temon de migrado kaj fluo de rifuĝintoj « sur la frontpaĝo » de la gazetoj. La senorda kaj tre neegala reago de la eŭropaj registaroj pri tiu fluo montris ke ili ne estis pretaj por regi kiel necesas tiel ampleksajn homfluojn. La NROj ne kapablis zorgi pri tiu temo kiel estis necese, spite al siaj multaj bonvolaj klopodoj. Iuj movadoj kaj politikaj partioj uzis la temon de la rifuĝintoj por antaŭpuŝi mallarĝe naciismajn politikojn, se ne malferme rasismajn. Fluo multe malpli forta da rifuĝintoj al Usono estigis tie

miksitaĵajn reagojn – el kiuj malmultaj por bonvenigi azilpetantojn.

La konferenco COP21, kiu okazis en Parizo lastan decembron, ofertis oportunecon por lumigi tion kio estas pli kaj pli konata, tio estas la « klimataj rifuĝintoj », homoj pelitaj al foriro pro la ŝanĝoj, kiuj okazas en la klimato kaj medio. La persista sekeco en la sahelaj ŝtatoj en la subsahara Afriko tiel kondukis al vastaj hommoviĝoj kaj estigis plej malfacilajn sociajn-ekonomiajn kondiĉojn.

En septembro 2016, la pintkonferenco de UNo estos oportunecon por kunordigita agado de NROj. La konferencoj kaj pintkonferencoj de UNo funkcias kiel magnetoj, altirantaj la registarojn, kiuj estas kondukitaj al kolektiva aliĝo al idealoj kaj normoj pli altaj ol tiuj al kiuj ili sendepende aliĝus. Ne temas nur pri hipokriteco – eĉ se ĝi ne estas for, ĉar la registaroj fakte ne havas planon por vivi tiujn idealojn. Temas pli ĝuste, pri la « kolektiva nekonscio » de la delegitoj de la registaroj, kiuj havas en siaj pensoj, antaŭvidon de la eliĝa monda socio bazita sur justeco kaj paco.

La rolo de la NROj estas konstante rememorigi al la registaraj delegitoj la gravecon de la temoj, kaj la ne malhaveblan kolektivajn agadon. La naciaj NROj povas atentigi pri lokaj kondiĉoj kaj tiel liveri informojn al la internaciaj NROj kun konsulta statuso ĉe UNo, kiuj ĉeestos la pintkonferencon en Novjorko. La NROj, proksimaj al la loĝantaro, povas liveri realisman vidpunkton pri la bezonoj de la familioj kaj pri la tipo de la antaŭmetotaj respondoj al tiuj bezonoj. La NROj akcentos ankaŭ pri la redukto de malriĉeco, subteno al la solvado de konfliktoj kaj obeo al la homaj rajtoj. Inter nun kaj fine de aŭgusto, ni havas tempon por arigi la serĉojn, analizi la mez- kaj longtempajn konsekvencojn kaj prepari proponojn de politikoj direkte al la registaroj. Tamen, ni ne havas tempon por perdi kaj niaj klopodoj devas komenciĝi ekde nun.

*René Wadlow  
Prezidanto Association of World Citizens  
Artikolo verkita la 28an de januaro 2016*



# Agrikulturo en malekvilibro

*En novembro 2010, la Kongreso de la Popoloj elektis sesiumi en Zagora, sudoriente de Maroko, je kelkaj dekoj da kilometroj de la Alĝeria Saharo. Tiu sesio arigis en forumon reprezentantojn de multaj civitanaj organizaĵoj prizorgataj pro evoluado de la provinco, homaj rajtoj, estonteco de la junularo, inaj kondiĉoj. Tiam rendezuo estis planota por nova renkonto. Tiel grupo el francoj kaj alĝerianoj ĵus veturis por renkonti la loĝantojn en kelkaj komunumoj de la provinco : en **Tagounite, Afra, Beni-Zoli**. En tiu artikolo, **kiel membroj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**, ni interesiĝu pli specife pri Tagounite, ĉar tiu komunumo tiom plene entenas la problemojn, kiuj antaŭ 34 jaroj, motivigis la kreadon de nia mutualisma organizaĵo.*



## Plivastiĝanta dezerto

Ekrigardo al prahistorio : tiu regiono pli kaj pli invadita de sablaj ventoj estis antaŭ tre longe, 7 milionoj da jaroj !, malseka arbaro, sur kiun pluvis pli ol unu metro jare. Poste la pluvoj iom post iom maloftiĝis tre longe antaŭ la homa ekapero. Nun la sumitaj pluvoj atingas jaran averaĝon de 60 milimetroj, 150 milimetroj en la plej bonaj jaroj. Tiu dezertiĝo rilatas al la geologiaj eraoj de nia planedo, kaj neniu povas ion.

En tiu regiono Souss-Massa, ne multe gastama, pli ol du milionoj da homoj vivas, ĉiuj loĝantaj laŭlonge de la fluejoj, kiuj defluas de Alta Atlaso : la valo de Draa kaj de kelkaj alfluantaj uedoj. Ne serĉu akvon. Ĝi estas precipe subgrunda, sed aperas tie kaj tie ĉi naskanta fekundajn oazojn. La Draa-valo estas unuavide grandega daktilpalmaro sub kiu estas kultivatataj fruktarboj, kiel olivarboj, pomarboj aŭ abrikotarboj, kaj la ombro de tiuj arboj protektas la grundajn kulturojn : luzerno, legumenacoj, melonoj. En proksimeco de tiuj oazoj, la iom humida atmosfero ebligas herbon ekkreski tuj kiam ekpluvas. Agrokulturado estas do kompletigita per malgrandaj bredadoj de ŝafoj, kaproj, dromedaroj.

## Malbonaj elektoj

**La dezerto progresas pro malbonaj elektoj.** Oni rememorigu la konvinkojn de la fondintoj de



MSM : krom la geologia dezertiĝo, ekzistas dezertiĝo, kiu rezultas de la homa agado sur la medion : senarbigado, neadaptitaj teknikoj de kultivado, de irigacio, nesufiĉa protektado kontraŭ erozio, netaŭgaj elektoj pri bestbredado, misproporcio inter la prinutraj homaj bezonoj kaj la nombro da brutoj, certe adaptitaj al senpluvaj tropikaj klimatoj, sed nemulte produktivaj.

En Tagounite kaj en la Draa-valo, tio ja ekzistas, sed ankaŭ elektoj faritaj pro la regionaj ekonomiaj necesoj kaj pro la demografia hompremo de la lasta jarcento. Sur la altaj montaroj de Atlaso, certajn jarojn la pluvoj estas abundaj endanĝerigante ĉiujn loĝantarojn instalitajn

en la valo, dum poste la sekecoj estas longdaŭraj. Por solvi tion, naŭ grandaj baraĝoj estis konstruitaj kun diversaj funkcioj : agrikultura irigacio, trinkakvo kaj modesta provo de reprovizado de la subgrundaj akvotavoloj. Betonaj akvoduktoj estis instalitaj por la distribuado de akvo en alvalaj palmejoj laŭ scienca socia alkemio. Sed problemoj pli multas ol solvoj :

- La nomaduloj fiksiĝis interalie en Agdez, piemonte de la Atlas-montaro ;
- La irigaciitaj spacoj de tiu oazo subite kreskis ;
- La akvodukto ne iras pli malproksimen ol la palmejo de Tissargat, ankoraŭ almonte de Zagora ;
- La ne-adaptita administra distribuado de akvo instigis la agrokultivistojn fosi milojn da putoj provizitaj per motorpumpiloj ;
- La palmeja irigacimaniĝo estas la ĉefa vehiklo de terura planta malsano : fusario kaŭzita de grunda funga malsano (infektado tra tero kaj radikoj). Tiu malsano, nomita "Bayoud" (elp.bajud) detruis grandan nombron de daktilpalmoj, kiuj pasis en kelkaj dekoj da jaroj de 4 milionoj ĝis 1,5 miliono en tiu Draa-valo.
- Zagora fariĝis urbo de ferirestado kaj de turismo, kun la kreado de multaj verdaj spacoj kaj privataj banejoj. La tiea akvopeto rapidege kreskas.

Iom pli sude, la komunumo Tagounite, en la oazo Ktaŭa, estas nur la kompatinda parencino de tiaj praktikoj : la ueda akvo malabundas, la subgrunda akvotavolo malaltiĝas kaj de 2002 la sala procento de tiu subgrunda tavolo igas akvon netaŭga por la konsumado.

### Kaj kio pri la dezertigo ?

Oni ne erariĝu ! Certe almonte la loĝantaroj iom kreskas en Agdez kaj Zagora, sed malkreskas en la palmejoj. Manke de palmoj la grundo fariĝas vundebla de vento kaj suno, la rendimentoj malkreskas, venas malriĉeco, foriĝas la junuloj. Kiam oaza bieneto perdas siajn loĝantojn kaj sian vegetalaron, ĝi dezertiĝas. En kelkaj jaroj la oazo Ktaŭa perdis 10 procentojn de sia loĝantaro, kaj certe pli pri ĝia kapablo rezisti al la disvastiĝo de la dezerto en tempo de klimata plivarmiĝo.



## COP-22

En 2016, la Klimatkonferenco de Unuiĝinta Naciaro en la lukto kontraŭ la klimata plivarmiĝo okazos en Marakeŝo. Ĝis estos "COP-22". Ĝis estos taŭga oportuneco por zorga pripensado en Tagounite, same kiel en la tuta Maroko. Sed ni estu klarvidantaj : post la nuleco de la COP-20 en Peruo, post la nefirmeco de la interkonsentoj de COP-21 en Parizo, ĉu oni devas atendi, por vivteni, ke la ŝtatoj bonvolu plenumi la promesojn anoncintajn pri lukto kontraŭ la klimata plivarmiĝo kaj pri socia justeco je transnacia nivelo ?

### « La aktivistoj »

En Tagounite, la respondo estas civitana. La homoj, kiujn ni renkontis sin mem nomas "la

**Notoj** : Monda Solidareco kontraŭ la Malsato estas fondaĵo de la Civitanoj de la Mondo, aprobita de la Kongreso de la Popoloj.

**Bajud-malsano** : " *Fusarium oxysporum f.sp.canariensis (Foc)*. Tiu fungeto ĉeestas preskaŭ ĉie tra la mondo, tie kie palmoj *Phoenix canariensis* estas plantitaj (Argentino, Kalifornio, Florido, Nevado, Kanariaj insuloj, Francio, Italio, Grekio, Maroko, Japanio, Aŭstralio). La "bajud"-malsano jam detruis pli ol 100 milionojn da palmoj en la mondo.

**Dokumento** : <https://hommesmigrations.revues.org/1241>

**aktivisto**”. Tiu nomo en si mem jam estas programo de lukto. La loĝantoj de Tagounite deziras starigi partnerecajn rilatojn kun aliaj teritorioj, kiuj frontas kontraŭ similaj problemoj. Ili petas ekkoni kelkajn realigitajn aŭ kurantajn evoluprojektojn al regiona prinutra kaj ekonomia memsufiĉo, al memmastrumado de projektoj. Tiuj projektoj estu modestaj kaj atingeblaj al homoj, kies averaĝa nivelo de kleriĝo al novigaj teknikoj ne estas sufiĉa.



La vojo al dezerto, kiun la turistoj traveturas trans la montaroj por iri en la saharajn sablojn por mediti ... aŭ por strebegi, tiu vojo pasas tra Tagounite. Unu el la celoj de nia vojaĝo tien konsistis ankaŭ en starigado de retoj de solidara eko-turismo, enspeza kompletigo por la agrikulturistoj, okazo de renkontoj.

Daniel Durand

## Ĝenerala Asembleo de la Nord-Togolandaj Globidaranoj en Sokodeo



### Aktivemo en Sokodeo !

La misio de Symphorien Meda kaj de John Agbeli dum julio 2015 plene sukcesis. Ĝi celis starigi taŭgajn kondiĉojn por balotelekto de estraro de la loka asocio de MSM (Monda Solidareco kontraŭ la Malsato) en Sokodeo. Tiu ekkontakta kaj kunaranĝa laboro estis rimarkinde daŭrigata kaj konkretigata de la provizora estraro (v. en *Monda Solidareco* n-ro 115 kaj 116)

Dum pluraj monatoj la vizitoj al la grupoj kaj la renkontoj sin sekvis ĝis la Ĝenerala Asembleo, kiu okazis la 19an de marto 2016 en la lokaloj de GIPATO (Interprofesia grupo de la Togolandaj metiistoj).

17 membroj sukcesis kunveni, kelkaj de malproksime, kaj partopreni en la Ĝ.A.. Post memprezentado kaj prezentado de la agadoj de sia grupo, okazis diskuto pri la maniero relanĉi la agadojn de loka asocio de MSM kaj pri la maniero replenigi la kason. Poste la plej maljuna kaj la plej juna el la asembleo aranĝis la balotelekton de la definitiva estraro.

La vikleco, seriozeco kaj volo de la provizora estraro estis agnoskita, ĉar ĉiuj estis reelektitaj. Do ni salutu per loka krio “Wabaah !” la balotelekton de (de maldekstre dekstren sur la foto)



S-ro. MASSIMAYELE Donko, prezidanto

S-ino ADAM Djénabou, kasistino

S-ro. KINANZIBA Béléi, sekretario.

Ni deziras al ili plenan sukceson por relanĉi MSM en tiu regiono.



# TUMAINI Support Group

Grupo en Kenjo n° 15-04 KE




Dum vojaĝo tra Kenjo en 2010 pluraj Globidaranoj renkontis la turisman gvidanton Kassim Shitawah.

La priskribo de la funkcmankiero de MSM al li farita naskis lian ideon aliĝigi grupon da vidvaj kaj malsanaj inoj, kiuj provas reciproke sin subteni je ekonomia nivelo por atingi prinutran memsufiĉon por si mem kaj siaj infanoj.

Depost Kassim Shitawah estas nia korespondanto ; li intervenas kiel interliganto inter Tumaini Support Group kaj MSM : tradukado kaj klarigo de la kontraktoj, veturado al Munias, korespondanto kun la Administra Konsilantaro de MSM, ktp.

Tiu ina grupo vivas en Munias, malgranda vilaĝo okcidente de Kenjo en la regiono de Kakanega. La lagego Viktorio troviĝas je ĉirkaŭ okdek kilometroj de la vilaĝo.

Antaŭ ol proponi projekton al MSM, la grupaninoj jam kune praktikis teksadon kaj brodadon. Ili posedas stebilojn, kiujn ili uzas por konfekcii lernejjajn uniformojn, kiujn ili vendas.



Oni donis al 10 grupaninoj po unu bovinon, kaj ĉiufoje kiam bovino naskas, la bovido estas donita al alia grupanino. La celo estas, ke post kelkaj jaroj ĉiuj anoj posedu unu melkeblan bovinon.

La membroj de Tumaini Support Group aliĝis al MSM, kaj proponis projekton por aĉeti kaj bredadi kokinojn kun la celo vendi ovojn, kaj kovigi la kokinojn por poste vendi kokinetojn en la bazaroj.



La projekto estis financita de MSM en novembro 2015.

# La vojoj de la solidareco

## ... pasas tra Burkinio

**Gnongondeme**, ina grupo en Bobodiulaso (grentenado)

La prezidantino S-ino Mariam Traore Zoury informas, ke la membroj aĉetis maizon, kiujn ili ankoraŭ ne revendis. Ili kontaktis la *Mondan Nutro-Programon*, kiu posedas filion en Bobodiulaso, kaj kiu aĉetas maizon kontraŭ bona prezo. MNP petis ilin pacienci. La malfacilaĵoj, kiujn ili renkontis, venas de tio, ke ili ne sukcesis aĉeti milion kaj sorgon. Krome la transporto de la grensakoj relative multe kostis. La pozitiva aspekto koncernas la interesan prezon de la maizo vendita de la kultivistoj. La ciferoj estas komunikotaj post la vendado de la maizo.

**Yankadi**, grupo el viroj en Padema, vilaĝo situanta je 70 km de Bobodiulaso (aktiveco : maizkultivado). Laŭ la membroj, la kampanjo estis relative kontentiga malgraŭ la tre malfrua havebleco de la semoj kaj grasumoj sur la merkato. Ili havigis al si hektaran rendimenton de po dek kvin sakoj (15), t.e. sume tri cent sakoj (300) sur la dudek (20) hektaroj. Pri la enspezoj, ili havas antaŭvidon de ĉirkaŭ unu miliono du cent kvindek mil (1 250 000) CFA frankoj por la vendo de cent maizsakoj.

**Toyow**, ina grupo en Padema (aktiveco : fabrikado de sapoj el karitea butero). La membroj ĵus komencis la aktivecon ĉar la financado de la projekto okazis komence de la lasta agrikultura kampanjo.

**Signignansigui**, ina grupo situanta en Dodugu, vilaĝo je 30 km de Bobodiulaso (aktiveco : grenmuelado). Dum kvin monatoj la muelilo ne funkciis pro paneoj, kies riparoj malfruiĝis. Ĉio estas denove en ordo kaj ili planas komenci la repagon antaŭ la jarfino. Tiu muelila projekto estis petita unuatempe por mildigi la laboron de la grupaninoj kaj duatempe provizi servojn al aliuloj. La ĉefa elekto ne estis fari el ĝi nur komercan utiligon. Eĉ ili proponis alian solvon por elturniĝi el tiu manko : la kultivado de pluvrizo.

**Song Kiiba**, gea grupo situanta en Vagaduguo. La grupo nun pretigas sian legomkultivan projekton.

**Wakogldo en Rimkeita**, gea grupo, situanta en la 14a sektoro de Vagaduguo (aktiveco : teksado de tradiciaj vestoj). Ekde decembro, la teksistoj fabrikis 38 robojn kaj ili sukcesis vendi 25 el ili. Unu membro ricevis klerigon kaj unu metilernantino nun ricevas klerigon.



**Wakogldo** : la ŝirmejo



**Wakogldo** : Aline teksas



**La membroj de la Federacia Administra Konsilantaro kunvenis la 12an de marto en Niort (Francio, 79) sub la prezido de Odile Durand**



↪ **Interna funkciado**

**Banka konvencio « ADISPO »** : Oni ekkontaktis kaj la dokumentoj necesaj por la konsistigo de la dosiero estos tuj liveritaj.

**Organizado kaj estonteco de MSM :**

Tiu punkto estos entagordita por la Ĝenerala asembleo de MSM-Globidar-Francio en Saint-Georges les Baillargeaux dum venonta septembro. La Pluzorgaj kaj Kunordigaj Burooj (PKB/BSC) estas asociitaj en la diskutado kaj invititaj doni siajn opiniojn, submeti siajn ideojn.

**Aliĝo de novaj grupoj** : la Administra Konsilantaro decidas prokrastigi la akceptadon de novaj grupoj. La financa situacio de MSM ne ebligas nun certigi al tiuj novaj aliĝantoj la financadon de iliaj projektoj. Kelkaj projektoj restas financendaj.

**Bulteno Monda Solidareco**

Nuntempe, la jara eldonritmo plu estas KVAR. Tiu punkto estos entagordigita por la Ĝenerala Asembleo de MSM-Globidar-Francio.

↪ **Kontencia servo**

La aferoj koncernantaj APGA, MAWENA, MOKPOKPO kaj CEPROFET : la kontencia servo ekklopodadis pri la dosieroj en Togolando kaj letero estos sendita al la Francia konsulejo en Vagaduguo pri tiu de Burkinio.

↪ **Kontaktoj**

Isabelle Hannequart (Mondcivitanino), Profesoro de internacia juro, kiu kunlaboris kun la Instituto de Tutmondismaj Studoj vojaĝis en decembro 2015 en Kongion. Ŝi renkontis Hippolyte Muaka, prezidanto de FOMARC en Boma. Nova grupo kandidatas por aliĝi al MSM.

↪ **Projektoj**

De Burkinio, la Administra Konsilantaro ricevis informojn pri la efektivigo de la projektoj de la grupoj Gnongondeme, Toyow kaj Yankadi en Padema, Wakogldo kaj pri la situacio de la projekto SINIGNANSSIGUI en Dodugu.

En Togolando, la Loka Asocio de MSM en Sokodeo sendis agadan raporton. La provizara estraro kunvokis Ĝeneralan Asembleon la 19an de marto.

En Kongio, la grupo FOMARC estis viktimo de superfluo. La porkidejo estas detruita kaj pluraj porkidoj pereis.

La sekvinta kunsido de la Administra Konsilantaro estis planita en Gemeaux la 2an kaj 3an de julio 2016.

*monda solidareco* estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

<p><b>JE VIA DISPONO :</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>➤ Aliĝiloj</li> <li>➤ Flugfolioj pri projektoj</li> <li>➤ Pliajn bultenojn</li> <li>➤ Federacia Reglmento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato</li> <li>➤ Afiŝetoj (A3-formato)</li> </ul> <p><i>Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)</i></p> <p><u>Nur por Eŭropo :</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>➤ Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikoĉemizoj 15 € kun la emblemeto « <i>Fonds Mondial</i> ».</li> <li>➤ Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « <i>Solidarité Mondiale contre la Faim</i> » + emblemeto : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €</li> <li>➤ Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.</li> </ul> <p><i>Se vi konstatas malfruigon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.</i></p>	<p><b>KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?</b></p> <p>↪ per franca ĉeko al <b>Globidar</b></p> <p>↪ per poŝtaj rimedoj, je la nomo de : <b>SMF- MONDA SOLIDARECO</b> (PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z) RIP: <b>FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056</b></p> <p>↪ per banka karto aŭ <b>PayPal</b> tra la retejo <b>www.globidar.org</b></p> <p>↪ ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.</p> <p>↪ UEA kontoj : <b>mfsk-g</b></p> <p style="text-align: right;"><i>Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno</i></p>	<p><b>RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ</b></p> <table border="0"> <tr><td>Febuaro 2016</td><td>317 €</td></tr> <tr><td>Marto 2016</td><td>207 €</td></tr> <tr><td>Aprilo 2016</td><td>1048 €</td></tr> <tr><td>Majo 2016</td><td>1037 €</td></tr> </table> <p><b>MONDA SOLIDARECO</b> estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.</p> <p><b>Jara abono : 5 €</b></p> <p><b>Redakcia komitato :</b> Claudine Tournier, Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, John De La Cruz, Edwige Géniteau, Christian Trianneau</p> <p><b>Fotoj el la fototeko de MSM</b></p> <p><b>Emblemo :</b> Yamsina Sahraoui</p> <p>Elfrancisgis Daniel Durand, kaj Christian Bertin Kontrolis (ne)</p> <p>Directeur de la publication : Daniel Durand CPPAP n° 0410 G 86482. Imprimerie de l'association. Tel : +33 (0)241 78 47 75 info@globidar.org <b>www.globidar.org</b></p> <p style="text-align: center;"><b>MONDA SOLIDARECO</b> Les Nids <b>FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE</b> Francio</p>	Febuaro 2016	317 €	Marto 2016	207 €	Aprilo 2016	1048 €	Majo 2016	1037 €
Febuaro 2016	317 €									
Marto 2016	207 €									
Aprilo 2016	1048 €									
Majo 2016	1037 €									